



'Nova Urbo'



UNUECO TRANS ĈIuj KULTUROJ

> ni Pontu <

Ni dankas al ĉiuj legantoj, kiuj reagis je nia propono partopreni en la projekto "Kultur-PONTE" ĉar tie – inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj – ekzistas la granda kaj ne preterpasinda ŝanco por nia movado.


*

En lastaj jaroj oni produktas en la mondo verŝajne pli da libroj ol homoj povas ilin tralegi. Tion eĉ pli komplikas la inundo de alispecaj kulturvaroj (ekz. aŭdio- kaj video-diskoj, interreto ktp).



La sama problemo **okazas** en la E-kulturo. Kia sorto atendas la klasikaĵojn de E-literaturo? En tia situacio tre urĝas transigi al cifereca sistemo eble plej multajn E-tekstojn, ilustraĵojn kaj sondiskojn /sonbendojn. Je la komenco, necesa prizorgi tiujn plej valorajn. Eble en tia formo ili pli facile vendiĝos aŭ oni povas ilin prunti elektronike el Hodler-Biblioteko, plenŝtopita ekde jardekoj. Similan prizorgon bezonas lokaj E-bibliotekoj, libroservoj, privataj / familiaj kolektoj aŭ multaj aliaj valorajoj de la Esperanta Movado.

Ni protektu ciferece nian heredaĵon



En la tempoj, kiam tradiciaj bibliotekoj serĉas aliajn formojn ol pruntado de libroj (ekz. ekzpozicioj, kulturaj eventoj) – la ideo de Interreta **Arkiv(ejo)** (*Internet Archive*) esperigas atingeblon al ĉiuj la kulturajn heredaĵojn. Nuntempe, pli kaj pli da socioj konsentas pri la esenca graveco gardo kulturajn valorajojn. Ja sen tio la homaro perdos sian memoron kaj ne kapablos lerni el siaj sukcesoj kaj eraroj. Ĝis nun, tian protektadon celis bibliotekoj kaj muzeoj, kies profesiuloj prizorgas la fizikajn objektojn, kiel ekz. libroj aŭ arkeologiaj elfosaĵoj.

Sed kion fari en la proksimiĝanta epoko, kiam oni ĉie uzos la ciferan tekno-logion (an: *digital artifacts*)? Ĉu vi imagas kiel por la estontaj generacioj ebligi atingon al scio pri ilia propra kulturo kaj heredaĵo? Nuntempe oni transigas tion al cifera formato de interreto. Sed tiu stokado ĉiam estas tre damaĝebla kaj facile malaperonta (aŭ forigota).



Al tiaj zorgoj intencas respondi unu senprofita organizaĵo nomita *Internet Archive* (**I.A.** - Interreta Arkivejo). Ĝi estas la plej granda kaj publike malfermita biblioteko, kiu funkcias laŭ en la elektromekanika sistemo. Kvankam fondita private, la I.A. estas senpaga por ĉiuj uzantoj. Ĝi enhavas ne nur amason da skanitaj libroj kaj periodaĵoj, historiaj dokumentoj sed ankaŭ elektronike ciferegitajn disaŭdigojn, podkastojn, muzikon, videojn. Tie troviĝas eĉ malnovaj versioj / variaĵoj de retpaĝaro (TTT-ejo), same kiel malfacile trovebla programaro / softvaro.



B.Kahle – kiel foran horizonton atingas via vizio?

La I.A. estis kreinta en 1996 de **Brewster Kahle** – komputila inĝeniero kaj (karisma) interreta entreprenisto. Antaŭe li elpensis Vast-aeran Informservilon (WAIS - Wide Area Information Server). Sekve li disponis pri depon-spaco de 10 petabajtoj (= potenco de 1000^5 kilobajtoj) kaj tiam starigis altan celon: krei elektronikan arkivon por konservi eble plej multajn artfaraĵojn* ke ili estu malfermitaj kaj atingeblaj same por sciencistoj, historiistoj aŭ profesoroj – kiel por ĉiuj simplaj homoj.

La Interreta Arkivo funkcias surbaze de tiuspecaj organizaĵoj kaj kunlaboras kun plej grandaj kulturaj, teknologiaj kaj registaraj institucioj. Tiel ĝi formas *Aliancon de Malfermitaj Enhavoj* (AdME / OCA - Open Content Alliance). La alianco helpas konstrui konstantan arkivon de diverslingvaj ciferecaj tekstoj kaj plurmedioj. Tiu enhavo estu malfermita al ĝenerala uzado, por ke ĉiu facile povus konatiĝi kun riĉa panoramo de la naciaj kulturoj.

(La tuta artikolo troveblas ĉe: <https://familiaro.com>)

Specialaj gastoj (parto 2)

Kiuj restas

Maria Karolina el **Junquito** vizitis kun geamikoj la Floreda-komunumon, lokita malproksime de la urboj kaj atingebla nur per ĵipo* (speciala veturilo, konstruita por vojaĝado sur malebena, primitiva grundo). Kam-paranoj vivas tie en malriĉeco, mankas elektro kaj bazaj produktoj.

Dekstre, sur la foto: Junquito estas la ĉefurba kvartalo de Karakaso /Caracas.



Ŝi proponis krei la "komunion de bonaĵoj" kaj proponis ke ĉiu donacu libere kion ajn ne estas necesa, ekz: vestaĵoj, ŝuoj, manĝaĵo, medikamentoj, amuziloj k.t.p. La propono estis tuj akceptita aplaŭde. Montriĝis, ke unu familio uzas tre malofte tiajn varojn, kiuj estas urĝe bezonataj de la alia. Tiel kreiĝis la familia atmosfero de kunlaboro kaj frateco; la homoj fidis, ke vivo ne estas tiel malespera kiam oni vivas inter geamikoj. Oni ĉiam povas malfermiĝi al bezonoj de la alia, sen atendi helpon de malproksimo.



Unu el indianaj familioj, kiuj vivas en la regiono Amazona.



Orinoko, la plej granda rivero de Venezuelo

Puerto **Ayacucho** estas urbeto en kiu vivas iom pli ol 40 mil loĝantoj, ĉefe en la aboriginaj (indianaj) komunumoj. Lokita apud rivero Orinoco* (eo: *orinoko*) kaj ĉe landlimo kun Kolombio, ĝi estas samtempe la ĉefurbo de venezuela Subŝtato Amazona. La tiea loĝantaro vivas en tre malfacila medio. En tiu malriĉa regiono oni trovas oron kaj loka loĝantaro vivas sub teroro de armitaj civilbandoj (geriloj). Dum pafado ofte mortas hazarde pasantaj homoj. Unu el ili estis juna kabo Felipe, protektante sian fraton de la gerilanoj. Lia morto ŝokis la komunumon, kaj unuecigis la junularon kunlabori persiste por paco.

La 2140-kilometra Orinoko fontas en Kolumbio, plejparte fluas tra Venezuelo kaj fine formas grandan riverdelton ĉe Atlantika Oceano.



“**Nova Urbo**” (Città Nuova / New City) estas internacia socikultura magazino de Fokolaro Movado, kiu antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj, komunumoj kaj – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996. Sekvajare, dum la vizito de Ch. Lubich en Usono (majo 1997), ni havis la okazon renkonti ŝin kaj peti pri la konsento eldonadi la bultenon “Città Nuova / New City” ankaŭ en Esperanto. Ni ricevis la pozitivan respondon kaj ekde tiam ĉi tiu bulteno eldoniĝas kaj kreskas pro abundeco de la pozitive interesaj materialoj.

Jen daŭrigo de la kultura fenomeno de Portugalio, lando kiu gastigis ĉi-jare la 103-an Universalan Kongreson.

Kultur-PONTE :

Fado (parto 2)- La reĝino

Amália Rodrigues kantis en kelkaj lingvoj, sed plej bone sin sentis en latinida lingvaro: franca, hispana, itala. Eble tial, tre varme akceptis ŝin la publiko en Rumanio kaj koncertoj de Amália en Italio estis aparte sukcesaj.



En sia 15-a jaraĝo Amalia komencis kanti amatore. Kantado de fadoj kreskigis ŝian polularecon en revuoj kaj estradoj. Tiel, en jaro 1939, por Amália malfermiĝis pordoj al brila profesia kariero. Tiel, en jaro 1939, por Amália malfermiĝis pordoj al brila profesia kariero. Unu el tiuj kantoj, kiuj markis firme ŝian karieron estas “**Nigra boato**” / *Barco negro*: (4:09) <https://www.youtube.com/watch?v=bKmCib5YsYo> .

Lerta kaj bone edukita komponisto Frederiko Valério rekonis tuj la grandan talenton de Amália. Konvene por ŝia profunda voĉo, li kreis multajn kantojn kaj foje aldonadis orkestran akompanon. Tiuj melodioj transpaŝis limojn de la tradicia, simpla fado kaj signife riĉigis ties formojn. Dum la 1940a jardeko Amália fariĝis tre fama en tuta Portugalio kaj oni oferis al ŝi aktoradon en filmoj. Sekvis eksterlandaj koncertoj kaj Amália veturis tra kelkaj eŭropaj landoj. En tiutempa programo “Coimbra” precipe famiĝis la samtitola kanto, konata internacie kiel “**Aprilo en Portugalio**” / *Avril au Portugal* (2:25) https://www.youtube.com/watch?v=IsNy9F4_ZhU .



Ĉi tie ni aldonas la du laste trovitajn kantojn de Amália Rodrigues:

1. Malĝoja gitaro / *Guitarra Triste* <https://www.youtube.com/watch?v=wQghRf9AwHQ>
2. Larmo / *Lágrima* (3:39) https://www.youtube.com/watch?v=uB48op6la_g

La Torĉo

Sportu ĝoje por sano



Monda Pokalo (parto 2)

Finiĝis la monda ĉampionado de futbalo - la plej populara sporto. En la ferma ceremonio partoprenis famaj sportistoj kaj popularaj artistoj el diversaj landoj. Ili kantis, muzikis kaj dancis, malgraŭ ke dumtempe sur la moskvan stadionon ekfalis pluvego. Ĉi tie povas rigardi parton de la adiaŭa koncerto (3:39): <https://www.youtube.com/watch?v=PycZR20IJP0> . Kun la infanoj kantas opera soprano A.Garifullina kaj tamburas – ĉu vi kredas? - la fama brazila futbalisto Ronaldinho.

Hodiaŭ ĉiuj scias, kiu venkis la pokalon kaj ni sendas al vi la duan parton pri ĉi tiu plej populara sporto. Survoje al la fina venko, la francaj futbalistoj malvenkis nur unufoje - kontraŭ Urugvajo kaj unufoje remis - kun Danlando. Ĉiujn ceterajn ili venkis.



Sur la foto: la feliĉa kapitano (franca teamestro) **Antoine Griezmann** kun la pokalo. Lia filineto aspektas serioza, malgraŭ la amasa ĝojo.



La originalan skulptaĵon por la *monda pokalo* faris itala artisto **S.Gazzaniga**. Ĝi montras du futbalistoj kiuj levas la terglobon. La rondan bazon ĉirkaŭas rando, sur kiu oni gravuras nomojn de la venkintoj en ĉiu sekva monda ĉampionado. La pokalo konsistas el 18-karata oro, pezas iom pli ol 6 kg kaj altas 36 centimetrojn. La originala pokalo apartenas al FIFA (Feteracio Internacia de Futbalaj Asocioj) kaj ĝi estos al neniu transdonita. Anstataŭe, la orkovritan replikon (duplikaton) oni enmanigas al kapitano /grupestro de la venkinta teamo.

(La tuta artikolo troveblas ĉe: <https://familiaro.com>)

Nia Vilaĝo

Homo kaj naturo



Utilaj plantoj:

Rosmareno – la simbolo de amo kaj fideleco

Rosmareno, konata en botaniko kiel "oficina rosmareno" (sciencia nomo: *Rosmarinus officinalis*) estas ĉiamverda arbusto el familio de lamiacoj (Lamiaceae*). Originale ĝi kreskis sur Krimea Duoninsulo kaj en la regionoj de Mediteranea Maro. Pro diversaj kaŭzoj, oni ŝatis tiun ĉi planton jam en la antikva epoko. La nomo "rosmareno" konsistas el du latinaj vortoj: *rozo* kaj *maro*. Etimologio (scienco pri deveno de la vortoj) sugestas, ke rosmareno devenas de "mara rozo" kiesodoro informis la maristojn surmare, ke ili proksimiĝas jam al ĉeflando.



Kiel herbaĵo, rosmareno utilas ĉar enhavas la substancojn, kiuj batalas kontraŭ bakteriaj kaj virusaj malsanoj, helpas dum alergio, reŭmatismo aŭ aliaj doloroj. Listo de ĝiaj avantaĝoj por sano estas longa kaj tiucele oni uzas rosmarenon en diversaj formoj, ofte kiel oleo. Ĝi utilas interlie por plibonigi cirkuladon de la sango, dum la sentoj de apatio, malforteco, kapdoloro aŭ depresio. Pro tiel multaj avantaĝoj, la planto estas ofte uzata en la kosmetika industrio.



Laŭ popola tradicio, la branĉetojn de rosmareno kun kolora rubando oni donacis al gastoj dum geedza ceremonio, ĉar tio simbolis amon kaj fidelecon. Pri rosmareno ekzistas ankaŭ popolkantoj kiel ĉi tiu, prezentita de portugalaj infanoj – (2:16) <https://www.youtube.com/watch?v=XAQH40G5zhw>. En Portugalio kreskas unika arbo: korka kverko (*Quercus suber*) sed pri ĝi aperos artikolo en alia n-ro de NU.